IpI

# Informilo *por* Interlingvistoj

Volumo 33 (kvara serio), numero 4 (129), 2024
ISSN 1385-2191

*Eldonas*

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)
interlingvistiko.net ⧫ @CED_interling

*Redaktas*

Başak Aray ⧫ Kimura Gorō Christoph (木村 護郎クリストフ)
Jorge Antonio Leoni de León ⧫ Bengt-Arne Wickström

Por kontakti la redakcion: IpI@interlingvistiko.net

# ENHAVO


**I Eventoj** 3

**1 La 21-a Internacia Kongreso de Lingvistoj (ICL), Laborgrupo interlingvistiko, 2024-09-8/14** 3

1.1 Organizantoj . . . 3
1.2 Loko . . . 3
1.3 Programo . . . 3
1.4 Raporto . . . 4

**2 46-a Esperantologia konferenco dum la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Arušo, 2024-08-08** 6

**3 La 2-a simpozio pri konstruitaj lingvoj, 2024-07-04/05** 6

**4 Konferenco: Esperanto en Asio, 2024-08-30/31** 7

4.1 Loko . . . 7
4.2 Programo . . . 7

**II Universitata kaj esplora agado** 9

**1 La Interlingvistikaj studoj en AMU finis sian agadon per la lastaj ekzamenoj** 9

**III Kulturo** 11

**1 Centro de Dokumentado pri Esperanto en Subirats, Katalunio** 11

**2 Esperanto en gazeteltondaĵoj** 11

2.1 Enkonduko . . . 11
2.2 La Kolekto Hachette . . . 12
2.3 Esplordemandoj . . . 12
2.4 Superrigardo pri la dukto . . . 12
2.5 Rezultoj: ONB-katalogeroj, plenteksta serĉado kaj IIIF-datumaro . . . 14
2.6 Ligiloj, financiga informo kaj komunumo . . . 14

**IV Personoj** 15

**V Bibliografiaĵoj** **15**

**1 Disertacioj kaj diplomlaboraĵoj** **15**

**2 Fakrevuaj artikoloj** **15**

**3 Libroj** **15**

**4 Libroĉapitroj** **15**

**5 Revu-numeroj** **16**
5.1 Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik . . . 16
5.1.1 Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik, 2024. ISBN: 978-3-96023-577-4. . . . 16
5.1.1.1 Enhavo . . . 16
5.2 Language Problems and Language Planning . . . 17
5.2.1 Language Problems and Language Planning, **48:1**, 2024. ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889. . . . 17
5.2.1.1 Enhavo . . . 17
5.3 Beletra Almanako . . . 19
5.4 Esperantologio / Esperanto Studies . . . 19
5.5 Investigationes Linguisticae . . . 19

**6 Novaĵleteroj** **19**

# I EVENTOJ

## 1 La 21-a Internacia Kongreso de Lingvistoj (ICL), Laborgrupo interlingvistiko, 2024-09-8/14

### 1.1 *Organizantoj*

Ilona Koutny kaj Nicolau Dols Salas

### 1.2 *Loko*

Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu, Poznano

### 1.3 *Programo*

- Věra Barandovská-Frank: Importance of Latin and Romance languages for the production of planned languages and their communities
- Sabine Fiedler: Esperanto linguistics – some reflections on 35 years of research
- Jorge Antonio Leoni de León: Generation of constructed languages with artificial intelligence-based methods: Theoretical, methodological and ethical aspects
- Natalia Dankova: Use of the article in spoken Esperanto
- Ilona Koutny: The role of István Szerdahelyi in interlinguistics
- Christopher Gledhill: Innovation and intervention in the terminology of Esperanto: The case of paronymic neology
- Philippe Planchon: The predicative parkers "iĝ" and "ig" in the verbal valency system of Esperanto
- Nicolau Dols: Converging and diverging trends in Esperanto
- Fabio Fortes: Language democracy, language rights, language equity and the use of languages for intercultural communication: A survey among students of languages and humanities in Brazil
- Marc van Oostendorp: Invisible regularization in a constructed language. The pronunciation of acronyms in Esperanto
- Başak Aray: Logical empiricism and language planning
- François Lo Jacomo: Is Esperanto enriched in the same way as a natural language?




ILUSTRAĴO 1.1 Prelegantoj de la interlingvistika sekcio

## 1.4 *Raporto*

La Internacia Kongreso de Lingvistoj estas la plej granda kaj prestiĝa aranĝo de lingvistoj kiu okazas ĉiun 5-an jaron en diversaj landoj. La 21-an (2024-09-08/14) organizis la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, partoprenis ĝin pli ol 500 homoj. Jen prezento de la kongreso (proksime al la fino vidiĝas Sean O'Riain).

Multaj sekcioj kaj laborsekcioj funkciis dum la semajno. La Interlingvistikan laborsekcion kun 12 prelegoj (el 11 landoj) gvidis Ilona Koutny (UAM) kaj Nicolau Dols (Universitato de Baleraj Insuloj, ES) ĵaŭde posttagmeze kaj vendrede. Dum la enkonduka parto, Duncan Charters, prezidanto de UEA kaj François Lo Jacomo, sekretario de la Akademio de Esperanto salutis la partprenantojn, poste Ilona Koutny skizis la terenon de interlingvistiko kaj esperantologio, fine Nicolau Dols prezentis la temojn kaj prelegantojn de la sekcio.

Interlingvistiko havas historian radikon en ICL, ja dum la 2-a kongreso en 1931, en Ĝenevo Otto Jespersen (konata dana lingvisto, adepto de Esperanto, poste de Ido kaj kreanto de Novial) iniciatis diskuton pri la problemo de internacia lingvo kiun partoprenis konataj lingvistoj (i.a. Sapir). Li enkondukis interlingvistikon kiel lingvistikan branĉon en «A New Science: Interlinguistics», *Psyche* 11 (1930-31), 57-67. Ĝi estis reeldonita kiel «Interlinguistics» en la libro *International Communication: A symposium on the language problem*, kiun redaktis Herbert N. Shenton, Edward Sapir kaj Otto Jespersen (Londono: Trubner & Company Limited, 1931, 95-120).

La temoj de la prelegoj estis diversaj (vidu ankaŭ supre):

Sabine Fiedler (DE) traktis la temojn de esperantologia fakliteraturo dum la lastaj jardekoj. Nicolau Dols (ES) analizis konverĝajn kaj diverĝajn tendencojn en Esperanto surbaze de la tekstaro. Christopher Gledhill (GB/FR) prezentis la problemojn de paronimoj kaze de terminoj. Philippe Planchon (FR) diskutis la uzon de *-ig* kaj *-iĝ* lige kun la verbaj valentoj. Marc van Ostendorp (NL, rete) esploris la prononcon de esperantaj akronimoj kaj komparis al aliaj esploroj. Natalja Dankova (CA) analizis la uzon de artikolo en parolataj, spontanaj tekstoj far latinidlingvanoj kaj slavlingvanoj. François Lo Jacomo (FR) traktis la manieron kiel Esperanto riĉiĝas per novaj vortoj. Ilona Koutny (HU/PL) prezentis István Szerdahelyi (interlingvisto, novema esperantologo, fondinto de la Esperanto fako en Budapeŝto) okaze de lia 100 jara jubileo. Fabio Fortes (BR) esploris kiomgrade la bazaj nocioj de esperantistoj – kiel lingva demokratio, lingvaj rajtoj, komuna lingvo en interkultura komunikado – estas akceptataj inter ne-esperantistaj studentoj en Brazilo. Başak Aray (TR) parolis pri logika empiriismo kaj lingvoplanado kaze de Carnap. Věra Barandovská-Frank (CZ/DE) elstarigis la rolon de la latina kaj latinidaj lingvoj en lingvoplanado. Jorge Antonio Leoni de León (CR) elektis aktualan temon, la uzon de AI (artefarita intelekto) en la konstruado de lingvoj, ĝiajn teoriajn, metodikajn kaj etikajn aspektojn.

Partoprenis pli ol 30 kongresanoj inkluzive la postdiplomajn interlingvistikajn studentojn (kiuj finekzameniĝis lunde – mekrede) kaj kelkajn ne-esperantistojn. La prelegoj okazis angle, sed estis ankaú esperantlingvaj demandoj poste, kiel tiuj de Alicja Sakaguchi (konata interlingvistino kiu reprezentas mallarĝan aliron al interlingvistiko). Ni planas publikigi libron el la prilaboritaj prelegoj. Dankon al ESF pro la subteno.

Krom la interlingvistika sekcio okazis prelegoj de aliaj esperantistoj: Bengt-Arne Wickström, Ida Stria kaj Sean O'Riain en la lingvopolitika sekcio, Rafał Darasz en la signolingva sekcio kaj Ana Alebić-Juretić en la sekcio pri historia lingvistiko (la du lastaj ĵus finis la interlingvistikajn studojn de AMU).

Dum la semajnfina kultura aranĝo Arkones kelkaj prelegantoj kontribuis al la programo: Nicolau Dols (Centjariĝo de la Kataluna Antologio kaj deklamis poemon en la kataluna kaj esperanta versioj), Antonio Leoni de León (Centramerika Konservejo de Kultura Propraĵo), Philippe Planchon (Familiaj nomoj kaj rakontoj), François Lo Jacomo (Ĉu nova rezolucio de Unesko pri Esperanto?) kaj Ilona Koutny (Plurlingvaj temvortaroj papere kaj rete – kun kunlaborantoj, finstudintoj; Raporto pri ICL, Prezento de Szerdahelyi). Ankaŭ Duncan Charters kaj pluraj aliaj instruistoj kaj studentoj de la Interlingvistikaj Studoj kontribuis al la varieco de la programo.

La foto montras prelegantojn de la interlingvistika sekcio.

*Ilona Koutny*

## 2 46-a Esperantologia konferenco dum la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, 2024-08-08

Dum la Universala Kongreso en Aruŝo okazis la jam tradicia Esperantologia konferenco de CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Lingvaj Problemoj), ĉi-jare organizita de Mark Fettes kaj Bengt-Arne Wickström (vidu IpI 128). Post saluto de la prezidanto de UEA, Duncan Charters, B.-A. Wickström bonvenigis la partoprenantojn kaj mallonge prezentis CEDn kaj ĝiaj publikaĵojn *Informilo por interlingvistoj* / *Information for interlinguists*, *Esperantologio / Esperanto studies* kaj *LPLP – Language problems and language planning*. La programo de EK konsistis el tri partoj: lingvoj kaj lingvouzo en Afriko, kulturo kaj lingvistiko de esperanto kaj diskuto pri la futuro de esperanto en Afriko.

En la antaŭtagmezaj sesioj, kiuj arigis ĉirkaŭ 40 partoprenantojn, H. Goes pritraktis la historion de esperanto en Afriko kaj M. Grosjean la lingvan situacion sur la kontinento. Post kafopaŭzo R. Corsetti kun elirpunkto en nova haŭsa-esperanta vortaro komparis la svahilan kaj haŭsan, D. Maxwell la svahilan kaj esperanton kaj É. Byelongo Isheloke diskutis, kiel la svahila kaj esperanto povsas antaŭenigi pacon en Afriko.

Posttagmeze partoprenis ĉirkaŭ 30 homoj kiuj aŭskultis prelegojn pri I. Szerdaheli (I. Koutny) kaj Cicio Mar (A. Madella). Sekvis Ph. Planchon pri la memstariĝo de esperantaj afiksoj. Fine fermis la duan parton K. Tytgat per prelego pri la uzo de esperanto de la Internacia asocio de policistoj.

La diskuton pri onta uzo de esperanto en Afriko enkondukis A. Adjé kaj A. Omba. Vigla diskuto sekvis. Ĝenerale oni opiniis, ke ekzistas bezono de pliaj gravaj eventoj kiel la UK en tuta Afriko por vigligi la uzon de esperanto.

La EK okazis en iom disa parto de la kongresejo. Tio kaj la oferto de kafo kaj teo en la paŭzoj helpis krei veran simpozian etoson kun viglaj interparoladoj dum la paŭzoj. La plej multaj homoj restis dum la tuta simpozio kiel endas en scienca evento.

*Bengt-Arne Wickström*

## 3 La 2-a simpozio pri konstruitaj lingvoj, 2024-07-04/05

Komence de julio 2024, okazis en Orléans (Francio) la 2-a eldono de la *Internacia simpozio pri la konstruitaj lingvoj* (france: *Colloque international sur les langues construites* / angle: *International conference on constructed languages*), organizita de la *Liĝera Lingvistika Laboratorio* (LLL, UMR 7270, Universitato de Orléans, Université de Tours, BnF, CNRS).

La simpozio daŭris dum du tagoj (la 4-an kaj la 5-an de julio), kaj ĝi ebligis la renkontiĝon de personoj interesataj pri tiu temo. La simpozio estis malferma por la ekstera publiko, kaj ĝi estis tre sukcesa. Entute ĉeestis. 40 / 50 homoj. La simpozio disvolviĝis tra diversaj sesioj, interalie pri komunikcelaj lingvoj (ĉefe pri Esperanto), pri fikciaj lingvoj, pri eksperimentaj lingvoj, pri socilingvistikaj temoj, kaj pri informadikaj rimedoj.

La enkondukan prelegon de la simpozio faris Federico Gobbo (Universiteit van Amsterdam),

kiu prezentis diversajn aspektojn de la temo, kaj emfazis la gravecon esplori la interlingvistikan tradicion, eĉ se temas nur pri konstruado de fikcia lingvo. La titolo de lia prelego estis: «On the art and craft of constructing languages: Lessons learnt from classic interlinguistics».

Dum la sesio pri la fikciaj lingvoj (ankaŭ nomataj «holivudaj lingvoj»), aŭdiĝis prelegoj pri la klingona, pri la elfaj lingvoj, kaj pri aliaj fikciaj lingvoj (ekzemple prahistoriaj fikciaj lingvoj). Al tiuj prelegoj aldoniĝis tri afiŝaj komunikaĵoj pri nove kreitaj fikciaj lingvoj. Estis ankaŭ pluraj prelegoj pri la programaroj uzataj por konstrui lingvojn, kaj prelegoj kiuj prezentis socilingvistikajn esplor-enketojn pri la konstruitaj lingvoj, kaj ĉi-rilate menciindas la prelego de Pierre Dieumegard (Esperanto Développement 45), kiu faris tian enketon en la urbo Orléans.

Dum la sesioj kiuj pli precize pritraktis Esperanton, estis prelegoj pri lingvistiko de la lingvo, interalie pri la tabelvortoj de Esperanto en tipologia perspektivo (Maximilien Guérin, Université de Lille), pri la komparo de Esperanto kun naturaj lingvoj (Ilona Koutny, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu), pri la afiksoj de Esperanto (Philippe Planchon, Université de Tours), kaj pri la funkciado de la adverboj en Esperanto (David Guérin, Université de Tours). Ankaŭ historiaj aspektoj de Esperanto estis pritraktitaj, en prelego pri la nuntempaj esploroj rilate al la esperantista historio (Pascal Dubourg, EHESS, CNRS), kaj en prelego pri la uzo de la vorto «Esperanto» dum la reformado de la turka lingvo (Başak Aray, Boğaziçi Üniversitesi).

La simpozio ebligis ankaŭ organizi du ekspoziciojn por informi la eksteran publikon pri la konstruitaj lingvoj. La unua estis organizita de Pascal Dubourg kaj rilatis al Lucien Péraire : «À travers l'Eurasie par l'espéranto (1928-1932)». La dua ekspozicio estis organizita de Edouard Kloczko pri la elfaj lingvoj de Tolkien. Al tiuj du ekspozicioj aldoniĝis elmontrado de deko da prezento-celaj afiŝoj pri malpli konataj konstruitaj lingvoj (Solresol, Blissymbolics, Anĝelika, Interlingua...), afiŝoj kiujn ellaboris gestudentoj de la universitato de Orléans dum la studjaro.

La programo de la simpozio ja estis tre riĉa, ĉar sume estis dudek prelegoj, kaj tio ebligis multajn interŝanĝojn kaj interesajn diskutojn. La detala programo estas plu videbla ĉe la retpaĝo de la simpozio (https://icon2024.sciencesconf.org). (Vidu ankaŭ IpI 128.) La organiza komitato esploras nun diversajn eblecojn por publikigo de la Aktoj, laŭeble kun facila kaj senpaga alireblo per la reto.

Fine, pri la tria eldono de la evento (do en 2026), oni jam pridiskutis dum la simpozio. Federico Gobbo proponis okazigi la simpozion en sia universitato, kaj tiu propono ricevis fortan aprobon de la ĉeestantoj. Do, espereble la venontan fojon la simpozio okazos en Amsterdamo!

*Philippe Planchon*

# 4 Konferenco: Esperanto en Asio, 2024-08-30/31

## 4.1 *Loko*

香港大學 / The University of Hong Kong

## 4.2 *Programo*

- Joseph Essertier: Saitō Hidekatsu, Esperanto, and the Roman alphabet in Japan and China
- Kadoya Hidenori: Saitō Hidekatsu and the Esperanto movement in wartime Japan

- Kamimura Kazumi: Saitō Hidekatsu's view of the people and Esperanto
- Derek Kramer & Edwin Michielsen: Esperanto on the radio: Broadcasting infrastructure and politics of universal speech in the Japanese empire
- Usui Hiroyuki: Mao Zedong and Kita Ikki: Esperanto as a paradoxical tool to supersede the West
- Nishida Chizu: Transnational anti-war movement by Hasegawa Teru, a Japanese esperantist in WWII
- Jessica Morgan-Brown: The interplay of poeticism and social critique in Dan Tirinaro's La Liberpoeto
- Hagiwara Ken: Esperanto in Japanese theatre: A means of bringing "Peripheral Japan" into the Light
- Lorraine Wong: Chineseness in Mao Zifu's Esperanto poetry
- Yauheniya Hudziyeva: Ideals, strategies and survival of Japanese Esperantists in Manchuria, 1905-1945
- Dongyoun Hwang: "Worlding" Korean students: Esperanto in anarchist education in post-1945 South Korea
- Josh Fogel: Fyodor Postnikov and the introduction of Esperanto to Japan
- Nicholas Y. H. Wong: Esperanto in colonial Malaya and Singapore
- Connie Kwong: Exploring Esperanto resistance literature in Hong Kong through a transcultural lens (1938-39)
- Bipasha Bhattacharyya: Mapping Esperanto in India: Contact zones of a universal language

# II UNIVERSITATA KAJ ESPLORA AGADO

## 1 La Interlingvistikaj studoj en AMU finis sian agadon per la lastaj ekzamenoj

La Interlingvistikaj studoj en la Adam-Mickiewicz-Universitato estis fondita en 1997 per rektora dekreto kaj la unua grupo startis en 1998. Nun, 2024-09-09/11, post 26 jaroj da funkciado, la oka grupo trapasis sian lastan ekzamenon kun defendo de faklaboraĵoj. Tiu ĉi grupo estis la plej granda komence en 2021 kaj ankaú fine. 11 gestudentoj prezentis siajn temojn (krome 3 sekvos baldaú) rilatajn al 3 specialiĝoj:

1. Tradukado (gvidanto de la unuaj 3 laboraĵoj: Chris Gledhill)
    - Gong Xiaofeng (CN): Apliko de universalaj trajtoj de tradukado en la tradukoj de ĉina klasika romano «Ruĝdoma Sonĝo» (recenzanto: Nicolau Dols)
    - O Gisook (KR): Korea-Esperanta traduko de korea moderna poezio (recenzanto: Klaus Schubert)
    - Vitor Tagor de Magalhaes Monteiro (BR): Aŭtomataj Tradukiloj (recenzanto: Klaus Schubert)
    - Yu Jianchao (CN): El la ĉina al Esperanto: diferencaj esprimoj en realaĵo, strukturoj kaj kulturaĵoj (aldone: etvortara ĉapitro pri lernado, gvidanto Ilona Koutny, recenzanto: Alessandra Madella)
2. Interlingvistiko (gvidanto Vera Barandovská-Frank)
    - Ana Alebić-Juretić (HR): La fonto(j) de la Fiuma idiomo. Ĉu la Fiuma idiomo estis la unua internacia lingvo en Rijeka (eksa Fiume)? (recenzanto: Ida Stria)
    - Renato sc Guedes Filho (BR): Ikoneco por artefaritaj lingvoj (recenzanto: Ida Stria)
3. Esperanto-movado (gvidanto Mark Fettes)
    - Fabio Fortes (BR): Kiom lingvo efikas sur la mondo? La utopioj kaj la politika programo de Esperanto laŭ Brazilaj esperantistoj (recenzanto: Kimura Goro Christoph)
    - Tim Owen (GB): Esperanto en Britujo: de la Unua Libro ĝis gastigado de la Universala Kongreso en 1907 (recenzanto: Ziko van Dijk)
4. Metodiko (gvidanto Katalin Kováts)
    - Maurizio Giacometto (IT/GB): Dedistanca edukado en Esperanto: la programo *Ekparolu!* kiel ilo por efika dua-lingva akirado (recenzanto: Peter Weide)

- Rafał Darasz (PL): Andrzej Pettyn – la pedagogia penso kaj aliro al instruado spegulita en liaj elektitaj lernolibroj de Esperanto (recenzanto: Barbara Pietrzak)
- Milan Kolka (CN): Pretigo de elektronika versio por plurlingva temvortaro (aldone: programado, gvidanto Ilona Koutny, recenzanto Markos Kramer)

Ankaŭ la unujaran instruistan trejnadon finis 5 partoprenantoj (gvidanto Katalin Kováts)

- Aranka László (CS): Reta instruado de Esperanto en miksitaj grupoj de vidantoj kaj nevidantoj
- Nedeljka Lozaniĉ (CS): Reta instruado de Esperanto por nevidantoj
- Yentl-Rose Hemelrijk (NL): Pedadogia analizo de verkigaj taskoj
- Lidka Komar (PL): Halina Komar kaj ŝia socia agado per Esperanto
- Zhang Changsheng (CN): Kultura konverĝo, tradukado kaj elpensoj por ĝia instruado (+ etvortara ĉapitro pri laboro, gvidanto Ilona Koutny)

Ili havis kompleksan ekzamenon pri Esperantaj lingvo, kulturo kaj movado, krome provinstruadon. Ni havis la bonŝancon gastigi ankaŭ la prezidanton de UEA, Duncan Charters kiu partoprenis en ilia prijuĝo.

Post la ekzamenoj okazis la Interlingvistika laborsekcio de la fama Internacia Lingvista Kongreso en Poznano kun 12 anglalingvaj prelegoj kaj diskutoj, kiun la studentoj povis partopreni. Ĵaŭde la studentoj kaj instruistoj de la Interlingvistika fako de AMU festis kune kun la prelegantoj de la Kongreso dum la agrabla bankedo. Dankon al ESF por la subteno de la studentoj kaj festado.

La kultura festivalo Arkones (same la lasta) fermis la semajnon kun riĉa programo. Pluraj kontribuoj de finstudintoj kaj instruistoj kolorigis la programon: Arko (Gong Xiaofeng) pri tradukado; virina agado; Longarko pri la Granda ĉina kanalo; Milan Kolka pri la estonta UK en Brno; kontribuo al la temvortara projekto; Hoan Thi Tran pri vjetnamaj manĝkutimoj. Vitor Monteiro gitarludis dum la miela vespero kaj Nicolau Dols deklamis katalunan poemon en la origina kaj Esperanta versioj. Michael Farris prezentis kreolajn lingvojn; Katalin Kováts per tabua kaj intima temo altiris la publikon: en la ombro de kancero. Ŝi ankaŭ RISKO-ludigis la partoprenantojn. Duncan Charters prelegis pri literaturo kaj pri UEA; Ilona Koutny pri la temvortara projekto kun siaj kunlaborantoj (ili prezentis la du novajn temvortaretojn kun ĉina versio); raportis pri la Lingvista Kongreso kaj rememoris pri sia instruisto kaj antaŭlo, István Szerdahelyi (fondinto de la Esperanto-fako en Budapeŝto) okaze de lia 100-jara jubileo. Ŝi prezentis ankaŭ la libron kiun ŝi kompilis el liaj verkoj.

*Ilona Koutny*

# III KULTURO

## 1 Centro de Dokumentado pri Esperanto en Subirats, Katalunio

Sabaton, la 6-an de julio, je la 11:30 horo komenciĝis la inaŭguro de la Centro de Dokumentado pri Esperanto en Subirats, muzeopropono kiu prezentas elekton de objektoj el la kolekto de la apotekisto Lluís Hernández Yzal, elstara esperantisto de Subirats, fondinto de la unua muzeo en la tuta hispana ŝtato dediĉita al Esperanto, la Hispana Esperanto Muzeo, en la jaro 1968.


La Centro de Dokumentado de Esperanto estas inaŭgurita kiel ekspoziciejo kun diversaj ekspoziciaĵoj pri la kultura movado de Esperanto, ĝia universala influo kaj, specife, ĝia efiko en la kataluna socio kaj ene de la loka sfero de Subirats. La nova kultura resurso estas lanĉita kun konstanta ekspozicio de selekto el la kolekto Lluís Hernández Yzal konservata en la arĥivejo de la Subirats-magistrato. La inaŭgura ceremonio okazis sur la Placo de la 1-a de Oktobro en Sant Pau d'Ordal antaŭ la urbodomo kun oficialaj paroladoj de la familio Hernández Massana kaj de la prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio. Poste, estis ludita la himno «Akcepto», kreita de Frederic Pujulà por la kvina Universala Kongreso okazinta en Barcelono en 1909. Sekvis libera vizitado de la Centro kaj fina degustado de glaso da ŝaŭmvino kun Ordal-persikoj. Krom la inaŭgura evento, je la 10-a horo, eblis fari la gvidatan esperanto-itineron tra la plej interesaj anguloj de Sant Pau d'Ordal. La evento estas organizita de la Magistrato de Subirats kunlabore kun Kataluna Esperanto-Asocio, kaj subtenata de la Barcelona Provinca Registaro.

La Centro remalfermiĝos la 28-an de septembro, la 26-an de oktobro kaj la 23-an de novembro, de la 11-a ĝis la 13-a horo. La vizito kompletiĝos per la esperanto-itinero, kiun oni povas fari libere per aŭdiopriskriboj tra diversaj punktoj de Sant Pau d'Ordal. Ekde januaro 2025, ĉiun kvaran sabaton de monato, okazos la gvidata esperanto-itinero kun aliro al la Centro por vidi la ekspozicion. Dum la 3a Naturamika Kultursemajno en Tossa de Mar en Oktobro, la prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio prezentos la tutan projekton en Esperanto. Ankaŭ estas planata postkongresa vizito al la ekspozicio.

## 2 Esperanto en gazeteltondaĵoj

### 2.1 *Enkonduko*

La ĉefa celo de la de CLARIAH-AT subtenata projekto *Esperanto-gazeteltondaĵoj* estis krei kompletajn tekstojn por gazetartikoloj el la Kolekto Hachette. Tiu kolekto enhavas artikolojn pri Esperanto el la periodo de 1898 ĝis 1915, kiujn konservas la Kolekto por Planlingvoj kaj la *Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko*. En tiu ĉi blogaĵo ni prezentas la deirpunkton, progreson kaj rezultojn de la unujara esplorprojekto.




ILUSTRAĴO 2.1 Ekzemploj el la kolekto

## 2.2 *La Kolekto Hachette*

La kolekto de gazeteltondaĵoj prilaboritaj en tiu projekto konsistas el ĉirkaŭ 17 000 artikoloj prenitaj el revuoj aperintaj ĉefe en Francio, sed krome en multaj aliaj eŭropaj landoj inter 1898 kaj 1915. La artikoloj mem raportas pri eventoj kaj homoj rilataj al Esperanto, ekzemple pri regionaj, naciaj aŭ Universalaj Kongresoj. Tial ili donas bonegan kaj unikan ŝancon studi la historion de la Esperanto-movado en Eŭropo komence de la 20-a jarcento.

## 2.3 *Esplordemandoj*


Kiel sekvo de la projekto, tiu grava kolekto de Esperanto-artikoloj fariĝis plen-tekst-serĉeblaj. Tio ebligas plian esploradon, ĉar la tekstoj nun estas alireblaj por analizoj uzante ciferecajn metodojn. Fine, ni kompletigis la kolekton kreante el simplaj skanaĵoj bildojn kun tekstaj dosieroj kaj metadatenoj ĉio en unu loko.

## 2.4 *Superrigardo pri la dukto*

Kadre de la projekto estis kreita dukto, per kiu plenaj tekstoj estis ĉerpitaj el la originalaj bildoj. Tiu dukto konsistas el kvar ŝtupoj:

1. Segmentado de la bildoj apartenantaj al artikolo en unuopaj tekstkestoj
2. Turnado de la tekstkestoj, por ke la teksto estu horizontala
3. Aplikado de Tesseract OCR al ĉiu tekstkesto por teksta rekono
4. Kreado de IIIF-metadatuma dosiero po artikolo surbaze de la generitaj tekstdosieroj

En la venonta parto ni pli detale pritraktos la unuopajn paŝojn, por ke ili povu servi kiel inspiro por projektoj kun simila historia materialo. Por la analizado de la aranĝo, ni uzas la modelon YOLOv8, kiu estas potenca modelo por kutimaj taskoj kiel objektorekono, bilda klasifiko kaj segmentado. Por plibonigi la kvaliton de aranĝrekono, fajnagordado estis farita per mane komentitaj bildoj. La modelo tiam estis aplikita al ĉiuj bildoj en la datumaro kaj ĉiuj sekcioj



Erziehung u. Unterricht

Beiblatt zum Kosmos, Handweiser für Naturfreunde

Zur Frage der internationalen Hilfssprache.




ILUSTRAĴO 2.2 Aplikado de la YOLOv8-reto al sekcio de du-kolumna artikolo en la datumaro. Maldekstre: originala bildo, dekstre: supermetado de la originala bildo kaj la generitaj tekstaj komentarioj

komentitaj kun «teksto» estis pludonitaj al la sekva etapo. Rigardu Ilustraĵon 2.2 por bildigo de la datumoj generitaj en tiu paŝo.

Tipa defio pri la gazeteltondaĵoj en tiu kolekto estas, ke ili ne estas gluitaj paralele al la randoj de la papero. La rezultkvalito de la plenaj tekstoj generitaj per tipa OCR-softvaro malpliiĝas signife, se la enigaj tekstoj ne estas plene horizontalaj. Tial ni evoluigis Python-skripton bazitan sur la malfermita biblioteko OpenCV, kiu rekonas la direkton de tekstbloko kaj poste turnas la bildon per la necesa angulo. Rigardu Ikustraĵon 2.3 por vidi la aplikaĵon de la skripto al du specimenaj bildoj.

Ni uzis la malfermitkodan programaron Tesseract OCR por tekstrekono, ĉar Esperanto kaj 21 aliaj lingvoj en la datumaro estas rekte subtenataj. En la kvara kaj lasta paŝo, la tekstdosieroj



**Groupe Espérantiste de Sens**

La fête de propagande espérantiste et de bienfaisance, que nous avons annoncée récemment, est définitivement fixée au samedi 14 décembre prochain. Elle aura lieu, comme nous l'avons dit, dans la salle des fêtes du nouvel hôtel de ville.

Le groupe espérantiste de Sens qui comprend actuellement plus de cent membres, peut compter sur un véritable succès. Nous savons, en effet, que les organisateurs n'ont rien négligé pour arriver à donner satisfaction même aux plus difficiles. Le concert, dont nous publierons le programme, sera suivi d'un bal.

×

A Cambridge, l'Association scientifique internationale espérantiste, fondée en principe à Genève en 1906, vient de se constituer officiellement sur la proposition de M. le général Sébert, membre de l'Institut de France et président sortant. Ont été élus : président, M. le professeur Schmidt, de Potodam ; vice-présidents, le professeur J. Thomson, de Cambridge ; M. Benoit, directeur du bureau international des poids et mesures, de Paris ; secrétaires, M. le professeur C. Bourlet, de Paris, et M. W. Schmurlo, de Stuttgart. Le siège du bureau central permanent de l'Association a été fixé à Genève.

ILUSTRAĴO 2.3 Apliko de la evoluinta Python-skripto al ĉerpitaj tekstkestoj. La rezulto de la kalkulo estas rotacio maldekstren de 3,36° (por la unua bildo de maldekstre) kaj 2,75° (por la tria bildo de maldekstre

apartenantaj al ĉiuj tekstkestoj sur unu paĝo estas kombinitaj en ununura dosiero, kiu estas konvertita al IIIF-konformaj komentarioj. Tiam IIIF metadatena dosiero estas kreita por ĉiu artikolo kun unu aŭ pluraj bildoj, el kiuj ĉiu enhavas la koncernajn tekstkomentariojn.

## 2.5 *Rezultoj: ONB-katalogeroj, plenteksta serĉado kaj IIIF-datumaro*

Kiel parto de la projekto la metadatenoj menciitaj supre estis integritaj en la katalogsistemon de ONB. Ili estas alireblaj per la termino «Sammlung Hachette». Tio ebligas serĉojn uzante la kutimajn filtrajn metodojn de la katalogo kaj inkludas ligilon al la koncernaj ciferecigitaj tekstoj. La ĉefa celo de la projekto estis igi la plenajn tekstojn de la gazetartikoloj serĉeblaj. Tio sukcesis per la helpo de Solr kaj ni ofertas plentekstan serĉon en la kolekto per la ONB-laboratorioj. Fakte, la elektita realigo permesas kombinitan serĉon en ĉiuj metadatenoj (titolo, aŭtoro, ĵurnalo, dato, loko, lingvo, ŝlosilvortoj) same kiel en la plenaj tekstoj, inkluzive de la kutima similecserĉo de Solr. Ni ofertas la generitajn datumojn kiel pakitan datumaron ĉi tie. Krom la projektrezultoj kiel elŝutaĵo, pliaj informoj pri la amplekso kaj enhavo de la datumaro estas tie alireblaj. Ekzistas ankaŭ informoj pri rajtoj, citproponoj kaj la ebleco foliumi la datumaron. En la spirito de kunfunkcipovo kaj reuzebleco, kiuj estis deziritaj en la alvoko por proponoj, ni kreis IIIF-kolekton, kiu enhavas ĉiujn IIIF-datumarojn generitajn en la projekto kaj tiel permesas aliron al ĉiuj bildoj, metadatenoj kaj plenaj tekstoj. Tiu kolekto estas alirebla ĉi tie.

## 2.6 *Ligiloj, financiga informo kaj komunumo*

Tiu projekto estis subtenata de CLARIAH-AT. La retejo de la projekto ĉe la financa subtenanto troveblas ĉi tie. Koresponda artikolo por tiu projekto inkluzive de pli teknikaj detaloj aperis en la retejo de ONB Labs. La fontkodo, same kiel la trejna datumaro kaj la generita modelo por aranĝa analizo troveblas en la Gitlab-deponejo de la projekto. Ni volonte respondas demandojn pri la projekto kaj antaŭĝojas konektiĝi kun la Esperanto-komunumo. Sendu al ni retmesaĝon al labs@onb.ac.at.

*Simon Mayer*

# IV PERSONOJ

# V BIBLIOGRAFIAĴOJ

## 1 Disertacioj kaj diplomlaboraĵoj

## 2 Fakrevuaj artikoloj

## 3 Libroj

Koutny, Ilona, Yu Jianchao [于建超] kaj Zhang Changsheng [张常生] (2024). *English-Esperanto-Chinese mini-dictionary on Education & Work / Angla-esperanta-ĉina etvortaro pri lernado kaj laboro /* 英语-世界语-汉语小词典学习与工作, Poznań: Wydawnictwo Rys. ISBN: 978-83-68006-38-4.

Szerdahelyi, István (2024). *Elektitaj artikoloj*, redaktis Ilona Koutny. Interlingvistikaj studoj 4. Poznań: Wydawnictwo Rys. ISBN: 978-83-68006-44-5. DOI: doi.org/10.48226/978-83-68006-44-5.

14 artikoloj pri iinterlingvistiko, esperantologio kaj pedagogio de la fama hungara esperantisto, kiu fariĝus 100-jaraĝa tiu ĉi jaro

## 4 Libroĉapitroj

Libert, Alan (2021). «The letter X in artificial auxiliary languages», en: *EUROASIA: Congress on scientific research and recent trends – VIII*. Redaktis Froilan D. Mobo kaj Merve Kidiryuz. Zambales: IKSAD Global Publications: 18–22. ISBN: 978-625-7464-03-1.

En la angla kaj iuj aliaj lingvoj la litero x relative maloftas kaj povus esti vidita kiel ekzotika. Fakte, ĝi tute ne okazas, aŭ nur en fremdaj vortoj, en kelkaj lingvoj, ekzemple en la turka. Aliflanke, ekzistas lingvoj kiel la franca kaj la somala en kiuj x pli oftas, kvankam ankoraŭ ne estas unu el la plej oftaj literoj de la alfabeto. Oni ankaŭ rimarku, ke x reprezentas malsamajn sonojn en malsamaj lingvoj, aŭ eĉ en la sama lingvo; ekzemple, en la angla ĝi kutime reprezentas [ks], sed ĝi povas ankaŭ reprezenti [z]. Ĉi tiuj estas faktoj pri naturaj lingvoj; la nuna artikolo priparolas tion en artefaritaj lingvoj, t.e. lingvoj kiuj estis konscie kreitaj, speciale en tiuj desegnitaj por internacia komunikado. La plej konata tia lingvo estas Esperanto.
La ĉefaj demandoj estos, ĉu x okazas en la lingvo, kaj, se jes, kian(j)n sono(j)n ĝi reprezentas. Ankaŭ, kvankam literfrekvencstatistikoj ne ekzistas por la plej multaj artefaritaj helplingvoj,

oni povus havigi ideon pri la ofteco de x ekzamenante ĉu ĝi okazas en oftaj vortoj kaj/aŭ afiksoj. En kelkaj artefaritaj helplingvoj, ekzemple Kah kaj Uropi, mankas x. Aliaj lingvoj, ekzemple Neo, havas x en sia alfabeto, kaj ĝi signifas la sinsekvon de la sonoj ks. En ankoraŭ aliaj lingvoj, kiel Ardano kaj Atlas, x elparoliĝas kiel sh en la angla. En Latino Moderne x havas la samajn du prononcomanierojn kiel en la angla. Ni tiel vidas diversecon en la funkcio de ĉi tiu litero en artefaritaj lingvoj, same kiel en naturaj lingvoj.

# 5 Revu-numeroj

## 5.1 *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*

### 5.1.1 Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik, 2024. ISBN: 978-3-96023-577-4.

#### 5.1.1.1 *Enhavo*

- Redaktoroj: Cyril Robert Brosch kaj Sabine Fiedler: Einführung: Plansprachen und Typologie (Enkonduko: Planlingvoj kaj tipologio)
- Věra Barandovská-Frank: Kann man Plansprachen typologisieren? (Ĉu tipologio de planlingvoj eblas?)

  En la interlingvistikaj kursoj en Poznano miaj studentoj intense okupiĝis pri la tipologio de planlingvoj kun la espero, ke eblos kompleta aŭ almenaŭ superrigardebla kategoriigo. Ni, precipe Szilva Szabolcz, kies tezon mi uzis en la lernolibro «Interlingvistiko», venis al la konkludo, ke tio ne eblas. La esprimoj «tipologio» kaj «klasifikado» ofte estas reciproke konfuzataj/interŝanĝataj. Klasifikado estas la plej alta nivelo de tipologio, kie la klasoj estas strikte limigitaj, elĉerpigaj kaj reciproke ekskluzivaj, t. e. ili devus esti tute malsamaj. Ĉi tio apenaŭ eblas ĉe planlingvoj. En tipologio, aliflanke, la transiro inter individuaj tipoj estas sufiĉe kontinua kaj kelkajn elementojn oni ne povas tipologie enordigi. Tiel okazas ĉe planlingvoj, kiuj ja estas priskribataj laŭ diversaj kriterioj pri konstruado, celo, realigo, sociiĝo ktp. Ĉi tie mi provos kapti la ĉefajn tendencojn en la tipologio de planlingvoj sen eniri grandajn detalojn.

- Cyril Robert Brosch: Warum sind internationale Plansprachen typologisch so, wie sie sind? (Kial internaciaj planlingvoj estas tipologie kiel ili estas?)

  La artikolo esploras, kiel la kvin plej gravaj planlingvoj rilatas al la plimulto de la lingvoj de la mondo rilate al 42 elektitaj tipologiaj trajtoj. Evidentiĝas, ke Esperanto, Ido, Okcidentalo kaj Interlingvao (multe malpli Volapuko) tipologie plejparte estas konformaj al la plimulto. Komunaj devioj de tio ofte estas klarigeblaj pro la influo de eŭropaj lingvoj, parte ankaŭ pro la malsama komunika funkcio de planlingvo kompare al etnolingvo. La artikolo defendas la vidpunkton, ke tia devio ne nepre estas io negativa. Tamen pliaj esploroj estas necesaj.

- Bernd Krause: Die Plansprache Ygyde – ein Portrait (La planlingvo Ygyde – portreto)

  Ygyde estas artefarita lingvo, inventita en la unuaj jaroj de la 21-a jarcento. La kontribuo intencas informi pri Ygyde, kiel ĝi funkcias kaj kio estas speciala pri ĝi. La lingvo

povas esti skribata per latinaj literoj kaj ankaŭ per propra skribo. Ĝi uzas alfabeton kun nekutima ordo de literoj, aranĝante la konsonantojn duope. Vortoj estas konstruataj per kombinado de du-literaj silaboj (konsonanto + vokalo), kun komenca litero determinanta la vortklason. Kelkaj vortoj estas konstruataj helpe de tabeloj, ekzemple koloroj, geografiaj terminoj aŭ nomoj kaj ankaŭ nombroj, kiuj povas esti uzataj en dekuma aŭ okuma sistemo. La inventintoj de Ygyde ankaŭ disponigas sistemon de «mnemonikaj sugestoj», kiuj helpas parkerigi vortojn. Pro neklaraĵoj kaj kelkaj multe tro malsimplaj konstruoj, Ygyde estis forte kritikata. Krome, ĉar ĝi povas esti parolata laŭ minimume du alternativaj manieroj, Ygyde montriĝas preskaŭ nepraktigebla.

- Cornelia Mannewitz: Russisch und Ukrainisch im Sprachvergleich (La rusa kaj la ukraina – komparo de du lingvoj)

  La rusa kaj la ukraina estas du lingvoj, kiujn oni ofte opinias tre similaj. Tiu ĉi artikulo okupiĝas pri precipe rimarkindaj diferencoj sur pluraj niveloj de iliaj lingvosistemoj.

- Graciela Morgado Rodriguez: Das Amindaj-Projekt (La projekto «Amindaj»)

  «Amindaj» estas kuba muzikgrupo, kiu de pluraj jaroj faras tradician kuban muzikon en Esperanto, kun ŝanĝiĝantaj anaro kaj amplekso. Intertempe aperis jam du albumoj kun kantoj, kaj «Amindaj» elpaŝis en pluraj internaciaj Esperanto-kongresoj.

- Klaus Schubert: Interlinguistik und Esperantologie – eine neue Bestandsaufnahme (Interlingvistiko kaj esperantologio: nova inventarado)

  Lastatempe oni proponis diverĝajn difinojn de interlingvistiko kaj esperantologio. Krome ofte publikiĝas sugestoj inkluzivi en la interlingvistikon novajn temojn. Ĵus aperis la ideo liberigi la esperantologion de la interlingvistiko. La artikolo tial inventaras kelkajn el la aktualaj perspektivoj al ambaŭ disciplinoj. La esperantologion oni difinu tiel larĝe, kiel Tonkin sugestas, do kiel lingvistikon, literatursciencon, kultursciencon, sociologion kaj politikologion pri Esperanto. La interlingvistiko esploru ĉiujn lingvajn kaj nelingvajn fenomenojn, kiuj rilatas al konscia stiro de lingvo kaj komunikado kaj samtempe al internacia aŭ interetna komunikado.

## 5.2 *Language Problems and Language Planning*

### 5.2.1 Language Problems and Language Planning, 48:1, 2024. ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889.

#### 5.2.1.1 *Enhavo*

- Igor Ivašković: The role of identification criteria in language: The Croation case

  La artikolo prezentas la kriteriojn uzatajn por distingi lingvojn kaj, en la kadro de strukturistaj kaj socilingvistikaj perspektivoj, esploras la rolon de identigaj kriterioj kuntekste de la kroata lingvo. Per kritika analizo de interpretado de diversaj kriterioj en kroata lingvistiko, la artikolo esploras la demandon de arbitreco en lingva diferencigo. La aŭtoro asertas, ke, pro tio, ke ĝi estas socia produkto, lingvo ne povas ekzisti ekster sia specifa kultura kunteksto; kaj, sekve, la aŭtoro konsentas kun la tezo, ke lingvo estas neeviteble influata de politiko. Ene de la limoj de la kroata lingvo, la artikolo ekzamenas plurajn

diferencigajn kriteriojn, inkluzive tiujn pri strukturo, genetiko, normigo, reciproka kompreneblo, kaj, notinde, identigo. Ĉi-lasta ŝajnas esti la plej neambigua ĉar ĝi kongruas kun la principo, ke lingvo apartenas al la tuta komunumo de siaj parolantoj. Tamen praktika aplikado estas iom defia.

- Cecilia Gialdini: Language-based capabilities to conceptualise linguistic justice

  La nuna artikolo proponas aplikadon de la kapableca aliro (CA) ene de lingva justeco, utiligante aliron bazitan je kapableco. La celita vojo estas disdividi la koncepton en lingve bazitajn kapablojn asociitajn kun publikaj varoj kaj takseblajn laŭ kvalitaj aŭ kvantaj metodoj, kongrue kun politikociklaj modeloj. La fina celo estas malkonstrui la abstraktan nocion de lingva justeco en trakteblajn komponentojn, nome lingve bazitajn kapablojn – tiel taŭgigante ĝin al ekzame- nado pere de politika analizo. Lingve bazitaj kapabloj estas kapabloj ligitaj al lingvaj varoj kaj servoj kiuj en si mem bezonas lingvon por ke ili entute funkciu. La ŝtato ludas esencan rolon kiel transformilo per justaj kaj efikaj lingvaj politikoj. Tiu dismeto en lingve bazitajn kapablojn faciligas identigon de unuopaj strategioj, tiel apogante la taksadon de lingvaj politikoj. Tia aliro ebligas ekzamenadon de la politikofara procedo, inkluzive ĝiajn efikecon, mankojn, kaj okazojn por plibonigo. La finfina celo estas traduki tre normecan aliron en operacian difinon, plue divi- dante ĝin en mezureblajn indikilojn kaj tiel antaŭenigante la fakon.

- Andreea S. Calude, Eline Zenner, Laura Rosseel kaj Hēmi Whaanga: Māori loanwords in New Zealand English: What can a picture-naming task reveal for language planning?

  La Indiĝena lingvo de Aotearoa-Novzelando, la maoria (Māori), spertas signifan revivigon, post severa perdo de vivokapablo fare de anglalingva koloniismo. Unu dimensio de tiu revivigo estas normigo de pruntoj el la maoria en novzelandan anglan (NZE). Tamen, nuntempe mankas empiriaj studoj de la nomadaj skemoj de plenaĝuloj koncerne konceptojn kiujn oni povas leksikigi en NZE pere de maoriaj vortoj. Ni raportas pri bildonomada eksperimento en kiu 48 partoprenantoj estas petataj nomi kompleton de celaj kaj kontrolaj bildoj de ĉiutagaj konceptoj el tri semantikaj kategorioj ligitaj al pruntoj el la maoria: floroj/bestoj, homoj/lokoj, materia kulturo. Sekve de fona demandaro, ni grupigas partoprenantojn en tri kategoriojn, depende de ilia orientiĝo al maoriaj lingvo kaj kulturo. La rezultoj sugestas klaran asociiĝon inter la orientiĝo de partoprenantoj kaj ilia nomado de maoriaj pruntvortoj. Ni pridiskutas alternativajn interpretojn, inkluzive demandojn por estonta esplorado pri la rilato inter leksika vario en NZE kaj pri lingvoplanado.

- Nicko Enrique L. Manalastas kaj Sean Virgil J. Auxtero: Legalities of language use in linguistic landscaping: Examining English linguistic imperialism in the Philippines

  Lingvaj pejzaĝoj, laŭ Backhaus (2009: 170), estas «konscie fasonataj kaj regataj de oficialaj reguloj kaj reguligoj». Tamen, al la aktuala korpuso de filipina esplorado pri lingvaj pejzaĝoj – temo jam subesplorata – mankas deproksima esplorado de naciaj filipinaj leĝoj rilate (re)produktadon de ŝildoj. La nuna referaĵo do ekzamenas elektitajn naciajn leĝojn pri afiŝoj, lokante tiujn leĝojn ne nur kuntekste de iliaj juraj precedencoj, mandatoj kaj historio, sed ankaŭ per ekzameno de 600 publikaj ŝildoj kolektitaj el ses diversaj regionaj centroj en Filipinoj. Ĝi ekzamenas kiel naciaj leĝoj daŭrigas tion, kion Phillipson (1992)

nomas «anglalingva imperiismo», kaj akrigas en Filipinoj la neegalan potencodinamikon inter tiuj kiuj parolas la anglan kaj tiuj kiuj ne parolas ĝin.

- Michael Hornsby: Recenzo de MacLeod & Smith-Christmas (2018): «Gaelic in contemporary Scotland: the revitalisation of an endangered language»
- Alice Leal: Recenzo de Ringe (2022): «The Language(s) of politics: Multilingual policy-making in the European Union»
- Robert Phillipson: Recenzo de Fidahić (2021): «Linguistic justice at the international criminal tribunal for the former Yugoslavia»
- Jeffrey Gil: Recenzo de Li (2019): «Language management and its impact: The policies and practices of Confucius Institutes»

### 5.3 *Beletra Almanako*

### 5.4 *Esperantologio / Esperanto Studies*

### 5.5 *Investigationes Linguisticae*

## 6 Novaĵleteroj

**IpI estas eldonaĵo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191.**

**Por ricevi informon pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al ipi@esperantic.org. Limdatoj por numero de sekva monato estas: 28-a de februaro, 31-a de majo, 30-a de aŭgusto kaj 30-a de novembro. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ en alia lingvo.**

***Estraro de CED***

**Mark FETTES (direktoro) ♦ Guilherme FIANS ♦ Klaus SCHUBERT**
**Humphrey TONKIN ♦ Michele GAZZOLA.**